

# Kvina Afrika Kongreso de Esperanto

## organizata de

## Afrika Komisiono de UEA  (AK)

## Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE)

## Scio Sen Bariloj (SSB)

**29an de decembro 2013 - 4an de januaro 2014**

**Kotonuo, Benino**

**ake-2013@yahoogroups.com**



**KONGRESA LIBRO DE LA**

**KVINA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO**

ELDONKVANTO : 500

PRESITA EN KOTONUO, BENINO

ĉe ATG IMPRESSION, Sinjoro Dometo

© SSB 2013

OOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOO

**Por viaj notoj** **Via nomo :.........................................**

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

..........................................................................................

# KONGRESA TEMO

## Esperanto

## kontaktlingvo inter afrikanoj,
## inter Afriko kaj la cetera mondo,
## por justa komunikado.

## L'espéranto

## langue-pont entre Africains,
## entre l'Afrique et
## le reste du monde,
## pour une
## communication équitable.

# LA TRI ORGANIZAJ INSTANCOJ

## Afrika Komisiono de UEA

| | |
|---|---|
| **Adjévi Adjé** | **Togolando (kunordiganto)** |
| **Jean Codjo** | **Benino-Kanado (vic-kunordiganto)** |
| **Karlo Alofa** | **Benino** |
| **Viktor Lufimpu** | **Kongo RDC** |
| **Emile Malanda** | **Kongo RDC Sud-Afriko** |
| **Justine Ralalarisoa** | **Madagaskaro** |
| **Jérémie Sabiyumva** | **Burundo** |

*Universala Esperanto Asocio (UEA)*

*Nieuwe Binnenweg 176*

*3015 BJ ROTTERDAM*
*PAYS-BAS*

*www.uea.org*

# LA TRI ORGANIZAJ INSTANCOJ

## Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE)

**Prezidanto : Latifou Gbadamassi**

**Sekretario : Joseph Tchokpodo**

**Kasisto : Pierre Houenavo**

***Landa Asocio de UEA***

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## Scio Sen Bariloj (SSB)

**Prezidanto : Privas Tchikpe**

**Vic-prezidanto : Annabelle François**

**Kasisto : Mireille Grosjean**

***Memstara NeRegistara Organizo***

# KONGRESA ORGANIZA KOMITATO (KOKo)



**Privas Tchikpe**
**Prezidanto de KOKo**
**Prezidanto de SSB**



**Adjévi Adjé**
**Kunordiganto**
**de Afrika Komisiono**



**Latifou Gbadamassi**
**Prezidanto de ABeE**



**Karlo Alofa**
**Membro de Afrika Komisiono**



**Sébastien Essou**



**Mireille Grosjean**
**Kasisto**



**Joseph Tchokpodo**
**zorgas pri enlanda informado**

**Adjévi zorgas pri la programo**

**Karlo zorgos pri helpo al kongresanoj**

**Sébastien zorgas pri la ekskursoj**

# KOTONUO SALUTAS VIN !!!

La nomo de la urbo signifas : loko, kie oni trovas akvon. Povas esti en lingvo fon, adja aŭ alia…

La KOTONA GAZETO informis, informas, informos vin pri la kvina Afrika Kongreso de Esperanto.

Gazo estas fajna ŝtofo por bandaĝi. La esprimo « Kotona Gazeto » signifas do bandaĝ-ŝtofeto el kotono. Kompreneble temas pri vortludo kun gazeto = ĵurnalo.

La urbo, kiu enhavas proks unu milionon da loĝantoj, situas je 6 gradoj da norda latitudo kaj 2 gradoj da orienta longitudo.




Mapo el la retejo www.izf.net

# SALUTMESAĜOJ

## De Mark Fetter (Kanado)

## Prezidanto de UEA

Salutmesaĝo al la 5a Afrika Kongreso de Esperanto

Karaj kongresanoj,

Mi sendas sincerajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de via kongreso. Mi ankoraŭ bone memoras la tempon, antaŭ kvarona jarcento, kiam la moderna afrika movado estis en sia plej frua infanaĝo. Tiam eĉ la unua afrika kongreso ŝajnis fora revo. Kaj nun mi havas la plezuron kaj honoron saluti jam la kvinan! Tio donas esperon kaj optimismon ne nur al mi, sed al miloj da esperantistoj tra la mondo.

Mi skribas en momento, kiam la okuloj de la tuta mondo turniĝis al Afriko, pro la forpaso de Nelson Mandela. Per sia persona ekzemplo li sukcesis montri, kiom granda estos la kontribuo de afrikanoj al la monda kulturo. Jen homo, kiu tutvive restis fidela al siaj radikoj, al siaj kunbatalantoj kaj al sia kredo, ke paco eblas. Eĉ en plej malfacilaj cirkonstancoj li fidis, ke venkos la justeco.

Tiu penso inspiru ankaŭ nin. Ankaŭ ni laboras por justa celo: por la egala digno de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj, por la senpera komunikado inter homoj de ĉiuj vivofonoj. Samtempe, same kiel Mandela, ni trovas tempon por klerigi nin, por distriĝi, por ĝui nian kunhomecon. Tiaj estas niaj kongresoj. Tia estu *via* kongreso!

Fruktodonan laboron kaj gajan kunestadon, do, elkore deziras

Mark Fettes
Prezidanto Universala Esperanto-Asocio 2013-12-18

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## De Guy Cavalier
## prezidanto de SAT-Amikaro (Francio)

Karaj kongresanoj,

SAT-Amikaro, asocio de franclingvaj laboristoj, salutas la partoprenantojn de tiu 5a Afrika Kongreso en Cotonou kaj deziras al ĉiuj fruktodonajn interŝanĝojn pri la ĉiutagaj socialaj viv- kaj laborkondiĉoj.

# SALUTMESAĜOJ

## De Hans Bakker (Nederlando)


Karaj amikoj,

Vi invitis min sendi saluton al la kvina Afrika Kongreso. Tion mi plezure faras.
Al la 5a Afrika Kongreso mi kore deziras sukceson. Ĝi kontribuu al la utilo de Esperanto kaj al la bonfarto de Afriko.

En la najbara Togolando jam de 10 jaroj funkcias Instituto Zamenhof. Ankaŭ tiu ĉi kontribuas al la utilo de Esperanto kaj al la bonfarto de Afriko.
Ni estas kolegoj, havante samajn idealojn. Se vi povas kaj volas viziti Instituton Zamenhof en Lomé, vi estas kore bonvenaj.

Ĉion bonan deziras al vi
Hans Bakker

2013-11-07



# Salutmesaĝoj
# De Lukasz Zebrowski prezidanto de TEJO (Pollando)

Estimataj kongresanoj,

Kun aparta plezuro, nome de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, mi salutas la 5-an Afrikan Kongreson de Esperanto.

Flanke de nia organizo nun estas tre grava momento rilata al Afriko. Kiel multaj el Vi certe aŭdis, jam antaŭ kelkaj jaroj TEJO starigis por si celon organizi Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Afriko. Poste evidentiĝis, ke tiam la ideo ankoraŭ estis tro frua, ĉar ni en TEJO ankoraŭ ne estis pretaj por tia defio. Kiam en la jaro 2009 la Komitato de TEJO difinis gvidliniojn pri tiu strategia celo, ni estis en alia IJK-epoko, ĉar TEJO-kongresoj okazadis ĉefe en Eŭropo en sufiĉe konataj al ni kondiĉoj.

Poste okazis grava ŝanĝo en kongresa politiko de TEJO - nur unu el 5 sinsekvaj kongresoj okazis en Eŭropo. El kongresoj okazintaj en Kubo, Vjetmanio, Israelo kaj ankaŭ el okazonta en Brazilo en 2014 ni lernis kaj plu lernas kiel agi en malsamaj situacioj, en aliaj kondiĉoj, kun pluraj kulturdiversecoj. Ni ekhavis spertojn, kiuj nun permesas al ni alimaniere pensi pri organizado de kongresoj ekster Eŭropo. Tial ĝuste nun estas la plej taŭga momento por reveni al ideo de IJK en Afriko.

La esplorojn pri ĉi tiu temo ni jam rekomencis. Certe estas ankoraŭ multe tro frue por ion ajn promesi - estas ja esplora fazo. Tamen mi esperas, ke iun konkretan proponon ni sukcesos prezenti ĝis la brazila IJK en venonta julio.

Ni en TEJO forte kredas kaj esperas, ke jam baldaŭ tiu revo - okazigo de tutmonda kongreso de junaj Esperantistoj en Afriko povas finfine realiĝi. Tion mi deziras kaj al vi en Afriko, kiuj tiom bezonas kontakton kun internacia Esperantujo, kaj al ni, kiuj jam de tiom longa tempo revas pri tia renkontiĝo en via kontinento.

Esperante je nia baldaŭa renkontiĝo, mi ankoraŭfoje elkore salutas partoprenantojn de la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto.

Łukasz Żebrowski

# Salutmesaĝoj

## De Mireille Grosjean (Svislando)
## Prezidanto de ILEI

Post semajnoj ĉi tie en Kotonuo, post pluraj kunsidoj kun la KOKo, post via alveno el diversaj mondopartoj, mi havas revon arde dezirante, ke

Kiam alvenas en kortumo advokato,

Kiam alvenas en klasoĉambro instruisto,

Kiam alvenas en akcidentoloko policisto,

Kiam alvenas en operaciĉambro kirurgo,

Kiam alvenas al parlamenta podio politikisto,

NE DEVAS LUDI IUN AJN ROLON

Ĉu temas pri li aŭ ŝi,

Ĉu temas pri nigrulo, aŭ arabo, aŭ blankulo, aŭ aziano, handikapito aŭ iu ajn homo.



# Salutparolado de la Prezidanto de KOKo S-ro TCHIKPE Privas kaj Prezidanto de SSB

- ✓ Altestimata Ministro pri kulturo kaj Turismo
- ✓ Altestimata urbestro de Cotonou
- ✓ Altestimata Prezidanto de ILEI
- ✓ Estimataj partoprenantoj en la 5a Afrika Kongreso de Esperanto
- ✓ Karaj invititoj
- ✓ Karaj gefratoj kaj geamikoj

Estas granda ĝojo kaj honoro por mi, ke mi povas aldiri salutvorton okaze de la malferma ceremonio de la 5a Afrika Kongreso de Esperanto.
Karaj moŝtuloj, karaj kongresanoj, karaj amikoj,

Mi salutas vin nome de mi mem, kiel prezidanto de la Kongresa Organiza Komitato kaj nome de la tuta KOKo.
Mi aparte salutas ĉiujn partoprenantojn en la kongreso kiuj, venantaj de foraj landoj kaj kontinentoj, internaciigis nian kongreson. Estu tre dankataj.
Ĉi-matene kaj dum pliaj ses tagoj ni kune restados en Kotonuo por fratumi, amikiĝi dank'al la internacia kaj demokrata lingvo **Esperanto**.
Mi volas profiti la okazon por, nome de la tuta KOKO de nia kongreso, unue danki al la tri establoj (Afrika Komisiono de UEA, Asocio de Beninaj Esperantistoj, kaj ''Scio Sen Bariloj'') kiuj, antaŭ unu jaro, kunvenantaj en Kotonuo, decidis proponi al UEA la okazigon de la 5a Afrika Kongreso de Esperanto en la ekonomia ĉefurbo de Benino.
Mi volas danki al UEA, kiu fidis tiujn tri establojn kaj konsentis aprobi ilian proponon. Mia danko al UEA estas despli granda, ke UEA ne nur konsentis permesi la okazigon de la kongreso, sed finance kaj morale subtenas ĝin.
Mi volas saluti kaj danki al ĉiuj esperantaj establoj kaj fizikaj personoj en la tuta mondo kiuj, iel, subtenis la kongreson.
Mi dankas al ĉiuj membroj de la Kongresa Organiza Komitato, kiuj senlace kaj sindone laboris, laboregis por ebligi okazigon de la kongreso.
Mi dankas al la aŭtoritatoj de la Benina Ŝtato kaj tiuj de la urbo de Cotonou, kiuj konsentis altprotekti la kongreson.
Mi ne finos mian salutmesaĝon, sen ke mi aparte salutos la nelacigeblan S-inon Mireille GROSJEAN el SVISLANDO, la Prezidanton de ILEI kaj Kasiston de nia kongreso, kiu faris kaj faras gigantan laboron ĉiuflanke, por ke nia kongreso povu efektiviĝi kun sukceso.
Ne nur pro tio mi dankas al ŝi, sed ankaŭ pro ĉio, kion ŝi faras kaj faradas, por ke la esperanta movado en Afriko aliru al pli da matureco kaj videbleco.
Karaj kongresanoj, karaj amikoj,
En la nomo de la tuta Organiza Komitato de nia kongreso, mi deziras al vi ĉiuj bonan kongreson kaj pro tio, ke ni estas ĉe la sojlo de nova jaro, plej varmajn bondezirojn pri sano, paco, sukceso kaj prospero.
La jaro 2014 estu por vi kaj por viaj familianoj plena je konkeroj kaj venkoj.
Vivu Universala Esperanto Asocio (UEA)
Vivu la Afrika Komisiono de UEA
Vivu la Asocio de Beninaj Esperantistoj
Vivu la asocio ''Scio Sen Bariloj''
Mi dankas vin!

# Salutparolado de Adjévi ADJE
# Kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA

Honoraj invititoj,

Karaj gesamideanoj,

Karaj geamikoj,

Mi havas la plezuron kaj honoron bonvenigi vin al la 5-a AKE en Kotonuo. Organizita de Afrika Komisiono, ABeE kaj SSB, tiu ĉi kongreso estas salutinda, ĉar temas pri restarigo de la tradicio pri la tutkontinenta kongreso, post 17 jaroj da paŭzo.

Kiel vi jam certe rimarkis, Kotonuo estas interesa kaj viva urbo kaj vi povas tuj senti la multajn influojn, kiuj formis ĝin. La bazarego Dantokpa, diversaj placoj kaj kuriozaĵoj, Kotonuo certe kaptos vin! Nepre ne maltrafu la viziton al la urbocentro.

KOKo sub la bonega gvidado de la veterano Privas Tchipke preparis memorindan semajnon por vi kun interesaj prelegoj, kulturaj aktivecoj, ekskursoj, distraĵoj… La kongresa temo, elektita de la organizantoj, tuŝas hodiaŭan problemon : "Esperanto – kontaktlingvo inter afrikanoj, inter Afriko kaj la cetera mondo, por justa komunikado".

La temo ne nur esprimas la deziron de Afrikanoj malfermiĝi al aliaj afrikaj kulturoj kaj al la cetera mondo en la hodiaŭa mondo, sed ankaŭ ĝi baziĝas sur la spertoj de Afrikanoj pri diverslingvaj problemoj regantaj en Afriko. La temo ankaŭ spegulas la kampanjon de UEA: justa komunikado.

Nome de Afrika Komisiono, mi volas diri, ke estis granda plezuro konatiĝi kaj kunlabori kun Privas kaj KOKo en la preparadoj. Mi direktas grandan dankon al ili pro la farita laboro. Ankaŭ mi volas diri dankon al la membroj de AK, ABeE kaj SSB pro ilia subteno kaj helpo.

Profitu plene tiun ĉi kongreson kaj feliĉan jaron 2014 al vi ĉiuj !

Dankon !

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Granda **danko** iras al multaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj

el plej diversaj landoj pro ilia subteno al nia Kongreso.

Substrekinda estas la subteno el Francio kaj Svislando.

# Salutmesaĝoj

# De Latifou Gbadamassi, prezidanto de ABeE

Saluton karaj gekongresanoj !

Universalaj Kongresoj plej ofte okazas en Eŭropo kaj pro tio homoj el aliaj mondpartoj malpli ofte havas okazon ĉeesti tiujn ĉi. Partopreno en UK por afrikanoj estas malfacila pro manko de mono kaj alfrontataj vizaj problemoj. Afrika Kongreso iniciatiĝis, fare de Hans Bakker, tiama prizorginto de afrika agado ĉe UEA, post petoj de afrikanoj pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Afriko. Tio ebligus al ili renkontiĝi, babili, interkonatiĝi, diskuti pri esperanto, simple utiligi la lingvon. La 1-a kaj la 2-a afrikaj kongresoj okazis respektive en Notse (Togolando) – de la 27-a de decembro 1990 ĝis la 02-a de januaro 1991 kaj Kotonuo (Benino) de la 28-a ĝis la 31-a de decembro 1991. La 3-an aranĝis Ganao de la 23-a de decembro 1994 ĝis la 02-a de januaro 1995 en marborda urbo Winneba 60 kilometrojn for de Akro, la ĉefurbo. Post la 4-a kongreso, kiu okazis de la 26-a de decembro 1995 ĝis la 3-a de januaro 1996 en Moshi (Tanzanio), plu ne estis kongreso kontinentskale. Tia aranĝo falis en forgeson.

Ĉu pro tiu stagnado Esperanto malaperis en Afriko ? Mi kredas, ke ne. Esperanto estas ĉiam en la koro de afrikanoj, ĉar en tiu mondparto ekzistas aktivaj landaj asocioj, pri kiuj ni havas fidindan scion, izole vivantaj esperantistoj en lokoj, kie ne estas aŭ respondis grupo, kaj ekstergrupaj esperantistoj en lokoj, kie estas grupoj. Ne mankas Ne-Registaraj Organizaĵoj, kiuj strebas por pripropagandi la verdan lingvon.

Tamen ĉiam mankas io. Temas pri ĝuo de internacia amikeco, interesaj kontaktoj kaj diskutoj pere de fizikaj renkontiĝoj kun esperantistoj el aliaj afrikaj landoj kaj aliaj mondpartoj.

Nun venas la 5-a Afrika kongreso, deksep jarojn poste, kiu ofertas al ni tiun oportunon. Mi ege fieras, ke mia lando Benino akceptas refoje tian historian eventon kun partopreno de gravuloj, aktivuloj kaj pioniroj. Kiel Prezidanto de ABeE, unu el la organizaj instancoj, mi deziras al vi ĉiuj fruktodonan kongreson en harmonio kaj feliĉo je la fino de la jaro 2013! Espereble tiu kongreso fortigos kaj puŝos antaŭen la movadon en tuta Afriko kaj en Benino aparte. Mi kaptas la okazon por danki UEA, kiu pere de Afrika Komisiono aprobis kaj apogis tiun kongreson. Same por ĉiuj aliaj instancoj kaj unuopuloj, kiuj ĉiamaiere kontribuas al ĝia okazigo. Apartaj dankoj estas adresitaj al SAT-Amikaro kiuj regule sendas al Afriko multfacetajn esperantaĵojn.
***Beatan Kristnaskon kaj Prosperan Jaron 2014!***

Latifou Gbadamassi, prezidanto de Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE)

**Venis el jenaj landoj salutmesaĝoj:**

1. Belgio
2. Brazilo
3. Bulgario
4. Burundo
5. Danlando
6. Ĉeĥio
7. Finnlando
8. Francio
9. Germanio
10. Hungario
11. Irano
12. Israelo
13. Italio
14. Japanio
15. Kongo RDC
16. Koreio
17. Nederlando
18. Nepalo
19. Nikaragvo
20. Norvegio
21. Novzelando
22. Rumanio
23. Slovakio
24. Suda Afriko
25. Svedio
26. Svislando
27. Taĝikio
28. Togolando
29. Ukrajnio
30. Usono

2013-12-22

De Miroslav Malovec el **Ĉeĥio**

Mi salutas vian kongreson el Ĉeĥio kaj esperas, ke ĝi spronos la agadon de esperantistoj en Afriko. Neniu miras, ke ekzistas esperantistoj en Eŭropo, de kiu Esperanto devenas, sed kiam ni montras, ke Esperanto sukcese disvastiĝas ankaŭ en Afriko, ĉiuj skeptikuloj estas surprizitaj kaj ilia kredo, ke Esperanto mortas, estas forte skuita. Tial ĝuste Afriko tiom gravas por la movado.  Amike

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-05

De James Rezende Piton  el **Brazilo**, ĉefdelegito de UEA

Karaj gekongresanoj,

El Benino venis la plej granda nombro de afrikanoj en Brazilon, en bedaŭrinda mallibereco, devigitaj de perforta sistemo laŭ kiu homoj estas ŝoveblaj peonoj. La oceano, kiu apartigas nin fariĝis pli plena pro la larmoj de tiuj, kiuj disiĝis de siaj landoj kaj familioj, dum jarcentoj. Ĉefe inter Ganao kaj Niĝerio troviĝas unu el la luliloj de la brazila kulturo kaj do kun kortenero kaj reverenco ni, brazilanoj, rigardu tiun vian regionon.

Se la situacio estis markita de multaj individuaj suferoj kaj familiaj tragedioj, por la profito de malmultaj, aliflanke tiu deviga enmigrado lasis al ni, brazilaj posteuloj, spurojn por la tuta vivo. Brazilo estas samproporcia rezulto de amerikaj, afrikaj kaj eŭropaj kulturoj kaj ĝi ne estus tia lando, kia ĝi estas, sen tiom da kontribuoj ankaŭ de afrikanoj. Tiuj spuroj audiĝas ĉiutage en afrikdevenaj vortoj de nia portugala lingvo, ili odoras kaj gustas ĉiutage sur niaj manĝokutimoj, ili vidiĝas en nia arto, ili sentiĝas en la pulsado de brazilaj ritmoj kaj ankaŭ de niaj koroj.

Se nur la ekspluatado de homoj fare de homoj hazarde kunigis brazilanojn kaj afrikanojn, en la hodiaŭa tago tute opozicia ideo kunvenigas vin en tiu ĉi salono. La homa ekspluatado anstatauiĝis tie ĉi de frata, vid-al-vida, internacia komunikado, kiu favoru la respekton al la diferencoj. Tion provizu al ni Esperanto kaj Esperanto-komunumo, kiu nepre havu 21ajarcentan alrigardon al la mondopartoj. Per tiu komunikilo audiĝu, sentiĝu, vidiĝu afrikanoj en la mondo.

Bonan kongreson al vi!   Kun altestimaj pensoj trans la oceano

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-22

Jean-Pierre Boulet kaj Monique Arnaud el **Francio,**
francaj partoprenintoj de la ILEI Konferenco en Benino en 2008.

La reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO tutkore salutas la 5an Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo.
Ni deziras al vi plezurigan kaj sukcesan laboron.  Tre amike.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-21

Keyhan Sayadpour,  el **Irano**
Prezidanto de  Irana Esperanto-Asocio

Nome de Irana Esperanto-Asocio mi gratulas al vi pro okazigo de la kvina kongreso de Esperanto. Pro vera universaliĝo, Esperanto ja bezonas disvastiĝon tra la afrika kontinento.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-21

De Mihai Trifoi, el **Rumanio**

Tre estimataj gekolegoj el Afriko,
Nome de la Esperanto-Asocio de Rumanio mi salutas vin ĉiujn kaj deziras al vi FRUKTODONAN KONGRESON! Via sukceso signifas ankaŭ nian sukceson.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-21

Asocio de esperantistoj de **Taĝikio**,
Sinjoro Firdaus Shukurov,  Dushanbe

Kara s-ino Mirejo kaj aliaj organizantoj de la Kongreso

NOME DE LA ESPERANTISTOJ DE  MIA LANDO TAĜIKIO MI SALUTAS VIN ĈIUJN KAJ DEZIRAS AL VI FRUKTODONAN KONGRESON !!
Bedaŭrinde, pro la multekosta vojaĝo, neniu el niaj anoj povas partopreni la Kongreson.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-21

Zsofia Korody  el **Germanio**
vicprezidanto de ILEI
prezidanto de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj
kunlaboranto de Interkultura Centro Herzberg

Karaj Geamikoj,

Nome de la instruistaro en Germanio kaj nome de Interkultura Centro Herzberg en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo mi kore salutas vin kaj deziras al vi tre sukcesan kongreson.

Mi bone memoras la unuan ILEI-seminarion, kiun mi gvidis en Benino kaj kun ĝojo renkontis multajn studemulojn tie. Mi salutas ne nur ilin, sed ĉiujn aliajn partoprenantojn de la nuna kongreso kaj tre bedaŭras, ke mi ne povas persone ĉeesti pro paralela grava renkontiĝo en Herzberg. Sed mi sekvas kaj sekvos ĉiujn eventojn de la 5a Afrika Kongreso kaj informos ankaŭ aliajn pri tio.

Havu sukcesan programon, interesajn prelegojn, tre agrablan kunestadon!

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-21

De LEE Jungkee (prez. de SEK / Estrarano de UEA) el **Koreio**

Okaze de la 5-a Afrika Espernato-Kongreso, nome de Seula Esperanto-Kulturcentro, mi sendas gratulmesaĝon kaj deziras sukcesan kongreson.

Atendante baldaŭan UK-n en Afriko.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

Flory Witdoeckt el **Belgio**
prezidantino de BEF

Karaj afrikanaj geamikoj,

La Belga Esperanto-federacio tutkore salutas la Kvinan Afrikan Kongreson de Esperanto.
Ni gratulas vin pro tiu grava evento en Benino kaj deziras al vi ĉiujn fruktodonan kongreson en harmonio kaj feliĉo je la fino de la jaro 2013!

Beatan Kristnaskon kaj Prosperan Jaron 2014!

altestime kaj amike via Flory

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Leysester Miró el **Brazilo**

Karaj samideanoj kiuj kuvenas por la kvina Afrika Kongreso de Esperanto.
S-ro urbestro el Kotonuo
S-ro ĝenerala sekretario de Benino por Unesko.

Nome de la Brazila sekcio de ILEI mi vin chiujn salutas kaj deziras fruktodonan kongreson. Esperanto fakte kunvenigas kaj alproksimigas homojn el diversaj landoj, mondopartoj kaj kulturoj. Ĉiuj el ni, esperantistoj, senlace laboras por iu mondo pli paca. Paco komenciĝas kun toleremo kaj toleremo komenciĝas, kiam oni kapablas kompreni, lerni kaj respekti la aliulojn, tiujn kiuj loĝas en nia sama vilaĝo, urbo, lando kaj ankaŭ tiujn, kiujn ni neniam vidis.
Vi afrikanoj kaj ni brazilanoj estas fratoj du fojojn. Vi estas nia plej aĝa frato laŭ kulturo ĉar la brazila kulturo ricevis influon de viaj kulturoj, vi donis al ni riĉan heredaĵon, sed ankaŭ ni estas fratoj ĉar la lingvo Esperanto kunvenigas kaj alproksimigas nin.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Jozefo Nemeth el **Hungario**
redaktoro/ sekciestro

Nome de la redakcio de Internacia Pedagogia Revuo, organo de ILEI kaj nome de la hungara sekcio de ILEI mi salutas vin kaj deziras al vi fruktoplenan laboron.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxXxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Stefan MacGill, Vicprezidanto de **UEA**

Sukceson en la preparado por la Afrika Kongreso, ni atendas viajn proponojn pri Seminario pri Aktivula Maturigo en la dua parto de 2014!

Kun jarfinaj bondeziroj...

Kun ĝojo mi salutas la kvinan Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE) en la nomo de la subteamo 'Movado' ene de la estraro de Universala Esperanto-Asocio. Mi esperas, ke multaj esperantistoj el diversaj landoj povos partopreni, kaj naski bonajn novajn ideojn por la antaŭenigo de la afero tra la kontinento.

Nia subteamo laboras nun por starigi serion da seminarioj pri Aktivula Maturigo (AMO) - jam tri estas deciditaj, en Hungario, Kanado kaj Ĉinio. Mi aŭdis, ke ankaŭ en Afriko ekzistas deziro okazigi tian seminarion - kies gvidado restos grandparte en la manoj de afrikanoj mem - kaj kies enhavo devos konveni al la specifaj bezonoj che vi.

Mi forte instigas vin eluzi la okazon de la 5a AKO por esplori kaj konsenti pri lando, urbo, dato, temo kaj ankaŭ potencialaj gvidontoj por tia seminario. UEA

subtenos viajn planojn, sed ni bezonos jam frue de 2014 havi klarajn decidojn prie. Eventuale unu gvidanto povos veni el ekster la kontinento.

Mi deziras sukceson pri tio, kaj ĉio alia, en viaj laborkunsidoj, kaj deziras grandan ĝuon el la programo kaj via kunestado.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Duncan Charters el **Usono**
Eks-prezidanto kaj eks-vicprezidanto de ILEI

Karaj gesamideanoj kunvenintaj en Kotonuo, Benino, Afriko,

Kun granda ĝojo ni konstatas kaj subtenas viajn klopodojn montri la utilon de Esperanto sur ĉiuj kontinentoj. Profitu tion, kion Esperanto donos al vi, kaj akceptu niajn dankojn pro tio kion vi redonas al la mondo per via agado.

Plensukcesan Kongreson kaj impeton al plua fruktodona agado mi deziras al vi el **Usono**.

Xxxxxxxxxx

De Karlo Ezebingaya el **Usono** (origine el Niĝerio)

Mi devas aplaŭdi la organizantojn de ĉi tiu kongreso por elekto de la temo 'Esperanto - kontaktlingvo inter Afrikanoj, inter Afriko kaj la cetera mondo, por justa komunikado'. Tio montras, ke ni bone konscias pri unu el la plej urĝaj problemoj, kiun ni alfrontas kiel homoj. Mi deziras al la kongresanoj eventoplenan kaj fruktodonan kongreson.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Katalin Kovats el Nederlando (origine el Hungario)

Katalin Kovats, redaktoro de **www.edukado.net**, la paĝaro por instruistoj, kiu havas plurdekojn da afrikaj membroj, tutkore salutas la partoprenantojn de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto.
Mi deziras al vi fruktodonan laboron kaj tre varmkorajn renkontiĝojn.
Via agado por nia internacia lingvo tre gravas kaj ni ĉiuj kun intereso sekvas vian laboron. Laŭ niaj ebloj ni ankaŭ subtenas kelkajn aktivulojn en via kontinento kaj pretos je tio ankaŭ en la estonteco.

Salutas vin amike, Katalin Kovats

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Monika Molnar(origine el Hungario) kaj Anke Brouwer (origine el Germanio) el **Svislando**

NOME DE LA ESPERANTISTOJ de SVISLANDO, NI SALUTAS VIN ĈIUJN KAJ DEZIRAS AL VI FRUKTODONAN KONGRESON !!
Ni salutas speciale tiujn gelernantojn de Latifou Gbadamassi, kiuj korespondas aŭ iam ajn korespondis kun niaj gelernantoj de la lernejo La Granda Ursino!!!

Amike Monika kaj Anke

xxxxxxxxx

2013-12-05

De Dietrich Weidmann el **Svislando**

Al viaj afrikaj amikoj kaj vi Mirejo mi sendas tre freŝegan aeron el Uster (kun minusaj gradoj), tio povas al vi ŝpari energion por ventumilo.
Amike Didi

xxxxxxxxx

2013-12-20

Dieter Rooke el **Svislando**

NOME DE LA TUTMONDA ESPERANTISTARO
MI DEZIRAS ESTONTE PARTOPRENI UK-ON EN VIA KONTINENTO .

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

ISIKAWA Tieko el **Japanio**
Sekciestro de la japana sekcio de ILEI

Okaze de la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto, mi salutas vin ĉiujn el fora Japanio kaj deziras, ke vi sufiĉe ĝuu la kongreson kaj enprenu energion por antaŭenigi Esperanto-movadon en Afriko!

Xxxxxxxxx

2013-12-20

SUZUKI Keiichiro el **Japanio**
Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto

Al esperantistoj en Afriko,

Nome de Japana Esperanto-Instituto, mi salutas vin ĉe la kvina Afrika Kongreso de Esperanto en Kotonuo.
Oktobre en 2013 ni japanoj sukcesigis la memorindan 100-an Japanan Esperanto-Kongreson en Tokio. Mi deziras, ke vi havu sukcesan kongreson kaj la kongresanoj havu fruktoplenan kaj ĝojan tempon.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-20

De Bharat Ghimire el **Nepalo**

NOME DE LA ESPERANTISTOJ DE MIA LANDO (NEPALA ESPERANTO) MI SALUTAS VIN ĈIUJN KAJ DEZIRAS AL VI FRUKTODONAN KONGRESON !!
Mi esperas, ke tiu ĉi kongreso estos grandega paŝo de nia movado en Afriko. Nepalo kvankam estas for teorie sed pretas kunlabori kun vi estontece.

Xxxx

Indu Devi Thapliya
Prezidantino de Nepala Esperanto Asocio

Nepala Esperanto Asocio kaj mi persone elkore salutas al ĉiuj gekongresanoj de Afrika Kongreso de Esperanto. Mi iam estis KAEM-ano kaj tiam mi pensis, ke certe devas okazi simila kongreso kiel Azia Kongreso en Afriko. Mi nun ricevis mesaĝon kaj sentas, ke mia revo estas realigita nun. Sub givido de efika skipo, mi esperas, ke la movado tie bone progresos. Ĉi foje ne eblis partopreni ĝin, tamen mi iam estontece certe partoprenos Afrikan Kongreson.
Forpasis Nelsan Mandela (lia animo restu pace) sed lia revo de egaleĉo kaj kunlabro estos plenumigita pere de Esperanto.
Bonegan sukceson al vi ĉiuj.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2013-12-06

Eddy Sava Babiu, **Kongo** RDC

Saluton! Mi estas Eddy Sava Babiu el Konga demokratia respubliko. Mi estas unu el la pioniroj de esperanto el nia lando. Mi estas tre kontenta pri la kvina afrika kongreso. Mi deziras al vi bonan kogresumadon! Plej amike. Eddy. Tiuj, kiuj deziras esti miaj amikoj ĉe facebook, jen mia datumo: eddy sava babiu. Ĝis la revido.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

De Renato Corsetti el Italio
Eksa prezidanto de UEA, helpanto de la Afrika Komisiono

Karaj partoprenantoj de la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto,

Mi havas la feliĉon povi sendi al vi mesaĝon en ĉi tiu grava momento de la evoluo de la Esperanto-movado en Afriko. Afrikaj kongresoj estas io grava por Esperanto kaj espereble en la venontaj jaroj ili povos okazi ĉiam pli ofte. Cetere tiaj kongresoj estas io, kio okazas ankaŭ en la aliaj kontinentoj, kaj la sorto de Afriko estas iĝi normala kontinento.

Nun Afriko ne estas normala kontinento. Ĝi ne vivas pace kaj ĝi ne ĝuas siajn riĉaĵojn. Kulpas pro tio, laŭ mi, kaj la neafrikanoj, kiuj abunde prenas el la afrikaj riĉaĵoj, kaj la afrikanoj mem, kiuj kunlaboras kun la ekspluatantoj. Tempo estas ankoraŭ bezonata, por ke Afriko iĝu normala.

En la kampo de Esperanto la situacio estas iom pli bona. La afrika movado iĝas ĉiam pli forta, kvankam mankas ankoraŭ la idealistoj de la eŭropa speco, kiuj dediĉas siajn tutajn fortojn al la progreso de Esperanto. Aliflanke, vi eble diros: ni ne povas ĝui tiun lukson de idealismo, ĉar ni devas solvi tre pli urĝajn praktikajn problemojn.

Nu, jes kaj ne.  Eŭropaj esperantistoj jam multnombre helpas praktikajn inciatojn en Afriko. La sumoj, kiuj atingas Afrikon, en formo de rekta helpo al projektoj starigitaj de espertantistoj en Afriko estas multege pli grandaj ol tiuj, kiuj venas rekte al la Afrika Komisiono por la 'oficiala' helpo. Aliflanke, se oni ricevas, oni devas ankaŭ redoni per laboro por Esperanto en Afriko. Tio estas la deziro de la eŭropaj donacantoj. Ili donas helpon por kosntrui puton, sed kompense ili deziras ricevi parolantojn de Esperanto.

Permesu al mi tuŝi alian temeton. Afrikaj esperantistoj devas lerni funkciigi asociojn en demokrata maniero, kiel tio okazas en multaj aliaj partoj de la mondo. Landaj asocioj ekzistas por helpi la lokajn Esperanto-grupojn labori por Esperanto kaj ili devas esti mastrumataj interkonsente kun ĉiuj esperantistoj de la lando.

Mi diris amason da malpozitivaĵojn sed nur por kaŝi mian grandan ĝojon pro la kongreso, kiu nun okazas. Afrikaj esperantistoj certe estas destinitaj al pli granda sukceso en la estonteco kaj al tiu mi invitas vin iri. Estu certaj, ke la tuta Esperanto-mondo rigardas vin kaj pretas helpi vin.

Sukceson al ĉi tiu kongreso kaj al ĉiuj landaj asocioj kaj lokaj grupoj en Afriko!
2013-11-05

OOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOOO

Granda danko iras al **UEA** kaj **Institucio Hodler**, ambaŭ en Roterdamo (NL), pro ilia subteno al la kvina Afrika Kongreso de Esperanto.

# UNIVERSALA KONGRESO

# VARSOVIO, POLLANDO

# EN LA JUBILEA JARO

# 1987

Danke al subteno de diversaj amikoj de Afriko,
pro la fakto, ke tiutempe eblis atingi Eŭropon,

partoprenis

**Mohamed BETTAHAR , Alĝerio**

**DJILALI, Alĝerio**

**Luc FEIDANGAI, Respubliko de Centra Afriko**

**Koffi GBEGLO, Togolando**

**Antoine KOUASSI KOUABLAN, Ebura Bordo**

**Jean-Marie MBOGE MBELE, Kamerunio**

**Agbemadon MENSA, Togolando**

**MINANI, Burundo**

**Privas TCHIKPE, Benino**

**Jean-Thomas Serafin WANG, Kamerunio**

**Alphonse DIATTA, Senegalo (mortis)**

**Ambroise YASSI, Ebura Bordo (mortis)**

**Kameroon ZAKEI, Ganao (mortis)**




# Nia kongresejo

### Komforto en JoCa

Ĉiu ĉambro aŭ loĝejeto (suite) havas propran banĉambron kun duŝilo, lavujo kaj necesejo. Ĉiu ĉambro estas ekipita pere de ventumilo kaj klimatizilo. Bonvolu ĉion malŝalti, kiam vi forlasas vian ĉambron. Bv ne lasi vian ĉambron malŝlosita : en kazo de ŝtelo la organizantoj ne respondecas.
En la supera etaĝo de JoCa estas la kunvenejo. Tie niaj aktivecoj okazos. Inkluzive niaj manĝoj. Vi povas vidi la domon kaj la kvartalon sur la blogo de Mirejo : mirejo3.blogspot.com. http://mirejo3.blogspot.com/2012/11/kotonuo-kulturcentro-joca.html. http://mirejo3.blogspot.com/2013/12/mireille-cotonou.html

### Praktikaj indikoj

Per veturilo oni bezonas ĉirkaŭ 20 minutojn por atingi la centron de la urbo. En la urbocentro estas aŭtomatoj por akiri kontantan monon per diversaj bankokartoj. La konstanta kurzo estas, ke 1 EUR valoras 665 XOF, tio estas franko CFA. Depende de aĉetado aŭ vendado, povas esti 650-665. Tiu franko estas la sama kiel en okcidenta Afriko. Ne la sama kiel en Kamerunio aŭ Burundo. Estas multaj butikoj, vendejoj kaj surstrataj vendistoj en la ĉirkaŭo de JoCa. Okazos duontaga ekskurso al la urbocentro.

### Utilaj retpaĝoj

- Rigardu la retejon www.esperanto-afriko.org, temas pri la retejo de la Afrika Komisiono de UEA.
- Rigardu https://eo.wikipedia.org/wiki/Asocio_de_Beninaj_Esperantistoj .
- Rigardu https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj kaj http://mirejo3.blogspot.com/2012/11/kotonuo-novembraj-eventoj.html
- Rigardu la lokojn de la ekskursoj en www.eo.wikipedia.org.
- Trovu tie la lokojn : Ouidah, Ganvié, Portonovo, Kotonuo, Portonovo, Benino…
- Rigardu www.songhai.org, la retejon de la centro Songhai, al kiu la ekskurso al Portonovo gvidos.

# PROGRAMO 2013-12-16

Ŝanĝoj povas okazi. HP = hotelo Havre de Paix Ĉiuj aktivecoj okazos en JoCa

| | Horo | Aktiveco | Respondeculo |
|---|---|---|---|
| **Dimanĉe 29.12** | 18:30 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Dimanĉe 29.12** | 20:00 | Interkona vespero | Mirejo |
| **Lunde 30.12** | 7:00 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Lunde 30.12** | 8:00 | Ekiro al la hotelo HP | Sébastien |
| **Lunde 30.12** | 9:00 – 11:30 | Malfermo en la hotelo HP | Privas |
| **Lunde 30.12** | 13:00 | Tagmanĝo | Privas Karlo |
| **Lunde 30.12** | 14:00 | Ekskurso Ganvié | Sébastien |
| **Lunde 30.12** | 19:00 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Lunde 30.12** | 20:00 – 20:45 | La Movado en Burundo | Jérémie |
| **Lunde 30.12** | 21:00 – 21:45 | Pri Amikaro Bruno Gröning | Franç. Hounsounou |
| **Marde 31.12** | 7:00 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Marde 31.12** | 9:00 – 11:30 | Strukturo de la Movado | Mirejo |
| **Marde 31.12** | 11:30 – 13:00 | Afrika Komisiono | Adjévi Karlo |
| **Marde 31.12** | 13:00 14:00 | Tagmanĝo | Privas Karlo |
| **Marde 31.12** | 15:00 -16:45 | Aspektoj diversaj en la rilatoj Eŭropanoj-Afrikanoj | Privas Adjévi Mirejo |
| **Marde 31.12** | 17:00 – 19:00 | Interkulturaj aktivecoj | Elisabeth |
| **Marde 31.12** | 19:00 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Marde 31.12** | 21:00 | Gaja vespero | Sébastien Privas |
| **Marde 31.12** | 24:00 | Danco | Sébastien Privas |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Merkrede 1.1.** | 9:30 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Merkrede 1.1.** | 10:30 – 12:00 | Ludoj | Mirejo |
| **Merkrede 1.1.** | 13:00 | Tagmanĝo | Privas Karlo |
| **Merkrede 1.1.** | 14:30 – 18:00 | Ekskurso Urbocentro | Sébastien |
| **Merkrede 1.1.** | 19:00 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Merkrede 1.1.** | 20:30 | Eo en Sud-Afriko | Emile |
| **Ĵaŭde 2.1.** | 7:00 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Ĵaŭde 2.1.** | 9:00 – 17:00 | Ekskurso Portonovo | Sébastien |
| **Ĵaŭde 2.1.** | 19:00 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Ĵaŭde 2.1.** | 20:30 – 21:00 | Pri Scio Sen Bariloj | Privas / Mirejo |
| **Ĵaŭde 2.1.** | 21:00 – 22:00 | Esperanto en Togolando | Adjévi |
| **Vendrede 3.1.** | 7:00 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Vendrede 3.1.** | 9:00 – 10:30 | Verduloj AVE | Illiassou, Hounsounou |
| **Vendrede 3.1.** | 11:00 – 12:30 | Esperanto en Benino | Latifou Sébastien |
| **Vendrede 3.1.** | 13:00 | Tagmanĝo | Privas Karlo |
| **Vendrede 3.1.** | 14:30 – 18:00 | Ekskurso Ouidah | Sébastien |
| **Vendrede 3.1.** | 19:00 | Vespermanĝo | Privas Karlo |
| **Vendrede 3.1.** | 20:30 | Kultura Vespero | Privas Karlo Séba |
| **Sabate 4.1.** | 7:00 | Matenmanĝo | Privas Karlo |
| **Sabate 4.1.** | 9:00 – 10:30 | Fermo | Privas |
| **Sabate 4.1.** | 12:30 | Tagmanĝo | Privas Karlo |
| **Sabate 4.1.** | 14:00 | Fin de la kongreso. Foriro | Privas |

# 5

## AFRIKAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

Unua kongreso:

Notse **Togolando** : 27/12/1990 - 2/1/1991

Dua kongreso:

Kotonuo **Benino** : 28 - 31/12/1991

Prez de LKK : Privas Tchikpe

Tria kongreso:

Winneba **Ganao :** 23/12/1994 - 2/1/1995

Kvara kongreso:

Arusha Moshi **Tanzanio :** 26/12/1995 - 3/1/1996

Kvina kongreso :

Kotonuo **Benino :** 29/12/2013 - 04/01/2014

Prez de KOKo : Privas Tchikpe

# EKSKURSOJ

## Duontaga al GANVIE

Ganvié estas unika loko en la mondo. Temas pri urbeto sur laguno. Laguno estas laŭ www.reta-vortaro.de apudborda, malmulte profunda lageto. Tiu lago nomiĝas NOKOUE kaj situas norde de la urbo Kotonuo. Fakto estas, ke komence de la 18a jarcento homoj provis fuĝi por eviti perfortan ellandigon kaj sklavecon kaj eskapis irante al tiu laguno, kie ili konstruis domojn super la akvo, portitajn de palisoj. La distanco inter la planko de la dometoj kaj la akvo estas proksimume unu metron longa. Kompreneble la domoj estas afrikstilaj, pro tio la komparo kun Venecio estas erariga. Ofte oni legas : Ganvié : la afrika Venecio ! Nuntempe vivas en tiu urbeto proks 30000 loĝantoj. La infanoj iras al la lernejo per ŝipo, la vendistoj iras al siaj klientoj per ŝipo. Vidiĝas kelkaj etaj surfacoj kun kaproj. Akvoplantoj kaj fiŝkaptistoj abundas. Jen foto de hotelo en Ganvié. En la ĉambroj troviĝas duŝejo, necesejo, ĉio dezirinda. Ĉu iuj el vi deziros resti tie kaj ne enbusiĝos fine de la tago ?



# EKSKURSOJ

## Tuttaga al PORTONOVO

Ĉar la Parlamento staras en tiu urbo, ĝi estas la ĉefurbo de la lando. Tamen ĝi estas pli malgranda ol Kotonuo, ĝi aspektas granda vilaĝo. En la Historio de nia Movado ĝi ludas gravan rolon, ĉar tie okazis la Konferenco de ILEI en la jaro 2008, la unua internacia evento en Afriko. Venis al tiu Konferenco homoj el 4 kontinentoj kaj multaj afrikanoj. Tiu Konferenco okazis en la Centro Songhai. Tiu Centro estas granda lertigejo por kamparanoj. Ĝia surfaco estas 15 hektarojn. Terkultivistoj lernas tie pli bone kreskigi legomojn kaj bredi bestojn : oni vidas la bredadon de porkoj, kokinoj, fiŝoj. Dum la Konferenco ni manĝis en la restoracio de la Centro nur ties produktojn. La Centro havas butikon, kie la urbanoj povas aĉeti fruktosukojn, konfitaĵojn, sapojn diversajn, ktp. La studentoj venas el la tuta lando kaj eĉ el aliaj franclingvaj afrikaj landoj. Nun la Centro akiris grandan fabrikon por recikligi plaston. En la Centro estas proks. 250 litoj.
La ekskurso al Portonovo gvidos nin al diversaj lokoj en la urbo kaj al la Centro Songhai, kie ni havos nian tagmanĝon.
La nomo Songhai estis la nomo de fama tre granda imperio, kiu etendiĝis sur la surfaco de pluraj nuntempaj afrikaj ŝtatoj : Malio, Niĝerlando, Ĉado, Togolando, Benino…. Tiu imperio estis memstara ; same la Centro Songhai en Portonovo klopodas esti memstara. (Laŭ intervjuo de la direktoro). Foto de la ESPERANTA ARBO en la centro.



# EKSKURSOJ

## Duontaga al KOTONUO URBOCENTRO

La urbo Kotonuo nuntempe nombras proks. unu milionon da loĝantoj. Teorie la ĉefurbo de Benino estas Portonovo, kie deĵoras la Parlamento. Tamen la registaro estas en Kotonuo, same kiel ĉiuj ministrejoj kaj ĉiuj ambasadejoj. Temas pri la ekonomia ĉefurbo de la lando. Plie la urbo havas havenon ; pro tio la trafiko de kamionoj svarmas en la havena kvartalo ĉemare.
Temas pri urbego kun ĉiuj eblaj servoj kaj ekipaĵoj. Ni vidos la Kongrescentron (vidu foton), la Konferencan Centron, la bazaregon Dantokpa, diversajn placojn kaj aliajn vidindaĵojn. Troviĝas luksaj hoteloj, universitatoj, hospitaloj, ĉiuspecaj vendejoj, kristanaj preĝejoj kaj moskeoj.



# EKSKURSOJ

## Duontaga al OUIDAH

Okcidente de Kotonuo situas historie tre grava urbo : Ouidah. Ĝi kuŝas ĉe la maro. Ĝi estis kolektejo por sklavoj. Tie ili devis atendi la enŝipigon. Tragika momento… Tian etoson oni sentas en Ouidah. Grandega monumento memorigas nuntempulojn pri tiu triangula komerco krima. Vidu la foton.
Ĉiuj homoj deziras morti tie, kie ili vivis. Afrikanoj en la sklava epoko same volis resti en Afriko por morti tie. Pro tio la sklavistoj ne nur metis al ili ferajn malliberigilojn ĉe la piedoj, sed ankaŭ ili metis tukon sur la buŝo, ĉar kelkaj provis manĝi sablon por morti surloke. Kelkaj saltis el la ŝipoj enmaren, tamen ili dronis tuj, ĉar kateno ligis ĉiam du sklavojn kune. Tiel neniu povas naĝi.
Ouidah krome estas bela urbeto. Vizitindaĵo estas la templo de pitonojo. Se vi ŝatas serpentojn, nepre vizitu ĝin.



# PARTOPRENLISTO

2013-12-22 el 12 landoj

| Familia Nomo | Individua nomo | Loĝlando | Kongresnumero | Retadreso |
|---|---|---|---|---|
| Haenni | Ueli Thomas | Svislando | 1 | ueli.haenni@swissonline.ch |
| Wang | Seraphin | Kamerunio | 2 | assofame97@yahoo.fr |
| Bakemhe | Louis | Kamerunio | 3 | |
| Grosjean | Mirejo | Svislando | 4 | mirejo.mireille@gmail.com |
| Adjé | Adjévi | Togolando | 5 | adjevi.adje@hotmail.com |
| Tchikpe | Privas | Benino | 6 | tchipri@yahoo.com |
| Gbadamassi | Latifou | Benino | 7 | latifougbadamassi@yahoo.fr |
| Tchokpodo | Joseph | Benino | 8 | benitajmanoj@yahoo.fr |
| Alofa | Karlo | Benino | 9 | alofkarlo@yahoo.fr |
| Essou | Sébastien | Benino | 10 | sandotour@yahoo.fr |
| Gato | Bella | Benino | 11 | |
| Tossou | Abdel Aziz | Benino | 12 | |
| Ave | Odilon | Benino | 13 | |
| Tchidi | Charles | Benino | 14 | |
| Klikan | Oliviane | Benino | 15 | |
| Dossou | Elisabeth (2001) | Benino | 16 | |
| Guiya | Cyprien | Benino | 17 | |
| Ahonon | Gobi Parfait | Benino | 18 | |
| Eke | Athanase | Benino | 19 | |
| Senoumagbe | Yaovi | Benino | 20 | |
| Schwarzer | Elisabeth | Germanio | 21 | elisabethschwarzer@web.de |
| Kradi | Kouami | Togolando | 22 | krak102@yahoo.fr |
| Kouassi Kouablan | Antoine | Ebura Bordo | 23 | antoinekouassi01@yahoo.fr |
| Sabiyumva | Jérémie | Burundo | 24 | jerrybs21@gmail.com |
| Malanda | Emile | Sud Afriko | 25 | emalandan@yahoo.fr |
| Hounsounou | François | Benino | 26 | hounfranc@yahoo.fr |
| Houssou | Bruce Lee | Benino | 27 | bchmdevil01@yahoo.fr |
| Dagba | Codjo | Benino | 28 | dagbacodjo@ymail.com |
| Houssou | Ruphino | Benino | 29 | ruphino02@gmail.com |
| Dagmarsdotter | Anita | Svedio | 30 | anidag@telia.com |
| Apelete | Agbolo | Togolando | 31 | agbolo77@yahoo.fr |
| Randrianasolo | Hyginet | Madagaskaro | 32 | ginchioginet@yahoo.fr |
| Edah | Kossi Kingslim | Benino | 33 | edgath19@yahoo.fr |
| Boukari | Illiassou | Niĝerlando | 34 | elliasdj@gmail.com |
| Amegadze | Yaoua | Togolando | 35 | senlime@yahoo.fr |
| Nouatsi | Kossi Senam | Togolando | 36 | sena.kosnouwa@gmail.com |
| Vodji | Wilfrid | Benino | 37 | wvodji@yahoo.fr |
| Hounsounou | Yves | Benino | 38 | hounsyves@yahoo.fr |
| Houansou | Aristide | Benino | 39 | aristidehouansou85@gmail.com |
| Faye | Assane | Senegalo | 40 | damanemanu2000@yahoo.fr |

uea Universala Esperanto-Asocio





# Afriko

- Afrika komisiono
- Benino
- Burundo
- Ĉado
- Ebur-Bordo
- Ganao
- Kameruno
- Kenjo
- Komoroj
- Kongo, DR
- Madagaskaro
- Malio
- Niĝerio
- Niĝero
- Senegalo
- Sud-Afriko
- Tanzanio
- Togolando
- Ugando

En la Reto rigaru http://edukado.net/biblioteko/fotoj?al=36 pri Esperanto en Afriko (Biblioteko -> Fotoalbumoj ->Afriko) kaj esploru en www.wikipedio.org

**Por viaj notoj :**

........................................................................................

........................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..............................................................................................

..........................................................................................

........................................................................................

.....................................................................................

........................................................................................

..............................................................................................


BIENVENUE A COTONOU
WELCOME TO COTONOU

